


ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ helmikuu ♦ februaro ♦ 1/2007



Prezidento de la respubliko Tarja Halonen gardas la jubilean jaron de EAF.



Nobelara domo en la jaro 1922.

Estraranoj ekster la nobelara domo, kie okazos la ĉefa 100-jariĝa festo.

Jubileo tago en Helsinko, p. 3-5

Joel Vilkki, p. 8 ♦ "Happi kvam pippi" en transpiranto, p. 10
Vintraj Tagoj, p. 15 ♦ Valamo-kursoj, p. 18 ♦ Arta Lumo, p. 21

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eaflehti@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ mmakita@utu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 050 365 0037 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Anna Ritamäki*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 18 e/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 12 e.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Anna Ritamäki*

Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ✉ (02) 423 246 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

tuomo.grundstrom

Tuomo Grundström, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ @lailanet.fi

Taneli Huuskonen, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli@poczta.onet.pl

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@jippii.fi

Börje Eriksson, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. ☎ (03) 785 1191 ✉ esperarto@phnet.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Timo Pirinen, Rinnetie 11-13 D 32, 06650 Hamari. ☎ 040 592 1756 ✉ timo.pirinen@gmail.com

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ saliko@kase.fi

Marjaliisa Parpala, Utinkatu 45 B 7, 45200 Kouvola. ☎ 040 717 4521

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): Sampo 800017-230825.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Oficejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Esperanto-Asocio de Finnlando 1907–2007

Alta Protektanto de la jubilea jaro: **Tarja Halonen**, Prezidento de la Respubliko

INVITO – KUTSU – INBJUDAN

Jubilea tago 28.4.2007 en Helsinko

ANTAŬTAGMEZA PROGRAMO EN LA URBO

9.00–12.00 HISTORIA KVIZOPROMENO

ESPERANTOVISAILU KAUPUNGILLA – ESPERANTOTIPS PÅ STAN

Startlokoj: Akademia Librovendejo, la Nobelara domo kaj aliaj

– Celgrupo: la ĝenerala publiko kaj esperantistoj

– Lingvoj: esperanto, finna kaj sveda

– Daŭro: 1-2 horoj / eblas respondi la demandojn sen viziti ĉiujn lokojn

VIZITO AL LA NOBELARA DOMO KUN ESPERANTLINGVA ĈĈERONO

Senpaga

14.00-17.00 JUBILEA FESTO EN LA NOBELARA DOMO

Ritarikatu – Riddaregatan 1

– La programon gvidas Harri Laine

– Festparolado Renato Corsetti, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio

– Arta programo i.a. vira koruso kaj kantelmuziko

– Akcepto de la Jubilea skatolo

– Historia prezento

– Kafopaŭzo kun jubilea kuko

– La festo estas esperantlingva kun okazaj esceptoj

Pago: 15 eŭroj

18.30-22.00 JUBILEA BANKEDO EN RESTORACIO SIPULI

Kanavaranta – Kanalkajen 7

– Triplada bankedo kun arta akompano

Pago: 70 eŭroj

BONVENON! – TERVETULOA! – VÄLKOMMEN!

La estraro de Esperanto-Asocio de Finnlando

Anoncu vian partoprenon, preferu ĝis la 31a de marto

pagante al la konto de EAF ĉe Sampo 800017-230825 kun referencnumero 80499

(samtempa pago de membrokotizoj, donacoj k.s. ebla)

informante pri la celo al Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65,

00530 Helsinko, retpoŝte: eafoficejo@esperanto.fi

– por ĉiu partoprenanto persona kaj familia nomoj

– plena poŝta adreso kaj, se adekvate, telefonnumero kaj retpoŝto

– eventualaj apartaj konsideroj (dieto, rulseĝa moviĝo k.s.)

Esperantoliitto juhlii 100-vuotispäiväänsä Helsingissä

Suomen Esperantoliitto ry, perustettu 28.4.1907 Helsingissä, viettää 100-vuotisjuhlapäiväänsä 28.4.2007 samassa kaupungissa. Päivän ohjelmaan kuuluu aamupäivällä *Esperantovisailu kaupungilla*, jonka tiedonantajina kaupungilla esiintyvät Suomen esperantohistorian merkkihenkilöt, mm. liiton ensimmäinen puheenjohtaja Nino Runeberg.

Pääjuhla Ritarihuoneella klo 14-17 on kulttuuripainotteinen. Juhlallisuuksiin osallistuu Esperanton maailmanliiton puheenjohtaja Renato Corsetti Italiasta. Päivä päättyy juhlaillalliseen ravintola Sipulissa.

Esperantovisailu klo 9-12 on kaikille avoin. Yleisen tiedotuksen lisäksi ainakin esperantojärjestöt ELFI (opettajat), Steleto (näkövammaiset) ja Skolta Esperanto-Ligo (partiolaiset) mainostavat tapahtumaa omille kohderyhmilleen.

Kysymykset julkaistaan esperantoksi, suomeksi ja ruotsiksi. Visailupaikkojen kierron voi aloittaa mm. Ritarihuoneella ja esperantoliiton perustamisosoitteesta Pohjoisesplanadi 39. Osallistujien kesken arvotaan palkintoja.

Tasavallan presidentti juhlavuoden suojelija

Tasavallan presidentti Tarja Halonen on ottanut vastaan Suomen Esperantoliiton kutsun ja ilmoittanut mielihyvin toimivansa 100-vuotisjuhlavuoden suojelijana.

Tasavallan presidentin mahdollisuus osallistua pääjuhlaan selviää vasta lähempänä tapahtuman ajankohtaa.



Republikens president beskyddare för jubileumsåret

Republikens president Tarja Halonen har mottaget inbjudan av Esperantoförbundet i Finland och meddelat att hon gärna verkar som 100-årsjubileumsårets beskyddare.

Huruvida republikens president har möjlighet att delta i huvudfesten klarnar först senare.

Esperantoförbundet firar sin 100-årsdag i Helsingfors

Esperantoförbundet i Finland, grundat 28.4.1907 i Helsingfors, firar sin 100-årsdag den 28.4.2007 i samma stad. I programmet ingår *Esperantotips på stan*, en tipspromenad med bemärkta personligheter från Finlands esperantohistoria som sagesmän, bl.a. förbundets förste ordförande Nino Runeberg.

Huvudfesten på Riddarhuset kl. 14-17 är kulturbetonad. Internationella esperantoförbundets Renato Corsetti från Italien deltar i festligheterna. Dagen avslutas med jubileumsbankett i restaurang Sipuli.

Esperantotipset kl. 9-12 är öppet för alla. Utöver den allmänna informationen om tillfället sprider åtminstone esperantoföreningarna ELFI (lärarna), Steleto (synskade) och Skolta Esperanto-Ligo (scouter) reklam för evenemanget bland sina målgrupper.

Frågorna publiceras på esperanto, finska och svenska. Tipspromenaden kan inledas bl.a. vid Riddarhuset och på adressen där esperantoförbundet grundades, Norra esplanaden 39. Vinster utlottas bland deltagarna.

Jubilea bankedo en restoracio Sipuli

La jubilea bankedo okazos laŭ februara decido de la estraro en Ravintola Sipuli (Restoracio Bulbo). Ĝi situas apud la ortodoksa preĝejo kun siaj belaj bulboj.

En la bankeda salono (finne bankettisali) ni



akompanataj de arta programo ĝuos tripladan vespermanĝon.

Restoracion Sipuli ni preferis al la Nobelara domo, kie ni origine planis organizi la bankedon, pro la alta kvalito de la restoracio en kombino kun pli facila kaj finance malpli riska organizado. Ni petas pagon de 70 eŭroj, kiu ne donos gajnon al EAF. Ni decidis tiel prioritati. Ni estas tre dankaj al Fondumo Esperanto kaj bonvolemaj esperantistoj pro financaj kaj personaj kontribuoj al la festotaga programo.

Ni kuraĝigas membrisocietojn kaj individuajn esperantistojn subteni la partoprenon en la bankedo de aktivuloj kaj gejunuloj kiel dankesprimon aŭ kiel kuraĝigon por daŭra agado.

La menuo ne estas fiksita je iro al la presejo, sed vi estas bonvena kontakti la vicprezidanton Päivi Saarinen por pliaj informoj. Ŝi respondas i.a. je la retadreso eafoficejo@esperanto.fi anoncita en la invito, pliaj kontaktinformoj sur p. 2.

La jubilea festo okazos en la Nobelara domo 14-17 kaj la bankedo en restoracio Sipuli 18.30-22. Por tiuj, kiuj deziras tranokti ni informas ke Eurohostel kaj hotelo Marina situas proksime.

La estraro

Memoru pri Societo Nino Runeberg

Vi estas tre bonvena aliĝi al la subtena Societo Nino Runeberg por 36 eŭroj. La societo estis fondita 1984 honore al la unua prezidanto de EAF.

La anoj de la societo estas invitataj al akcepto dum Vintaj Tagoj en Kotka kaj ricevos etajn surprizojn dum la jubilea jaro.

Anna Ritamäki, prezidanto

Esperantoliiton kannatusseura Societo Nino Runebergin jäsenmaksu on 36 euroa.

Esperantoförbundets understödssällskap Societo Nino Runeberg har medlemsavgiften 36 euro.



Polaj klopodoj pri judismo

En decembro oni eksciis, ke la juda deveno de Zamenhof estis unu el la argumentoj kontraŭ la esperantlingvaj elsendoj de Pola Radio. "Se eĉ Israelo ne elsendas en

Esperanto, kial do Pola Radio tion faru? Zamenhof ja estis pollandano, sed de juda deveno", argumentis Jerzy Targalski, vicprezidanto de Pola Radio.

Oni povus supozi, ke precize poloj, kiuj estis inter la plej severe traktitaj nacioj pri la dua mondmilito, speciale volus kontraŭi tiujn hatojn, inkluzive antisemitismon, kiuj estis motivoj de la milito. Sed, ĉu hazarde aŭ ne, mi havas unu personan sperton pri antisemitismo, kaj ankaŭ tiu okazis en Pollando.

La okazo naskiĝis, kiam mi bicikle vojaĝis en Pollando kaj en iu urbeto serĉis restoracion por povi manĝi. En tiu serĉado mi involviĝis en diskuton kun iu loĝanto de la urbeto. Tre malfacile, ĉar komunan lingvon ni vere ne havis. Li parolis nur malmultajn vortojn kaj malfacile kompreneble la anglan, intertempe ni provis ankaŭ en la rusa, pri kiu mi tamen konas nur iujn unuopajn vortojn kaj tre simplajn frazojn.

Fine ni tamen sukcesis interkompreni tiom, ke li gvidis min al restoracio, kaj mi aĉetis al li bieron. Kiam ni do sidis ĉe tablo kun manĝo kaj biero, mi ekhavis ideon, kiu ŝajnis al mi bona. Mi volis montri al li libron en Esperanto, kaj vidi ĉu li eventuale sciis ion pri la afero. Kaj tre trafe mi hazarde

havis libron, kiu titolas "Zamenhof kaj judismo". Bonega por provi, ĉu la alia ulo rekonus la nomon *Zamenhof*, tiu ja devas esti relative konata nomo en Pollando, kun multaj stratoj nomitaj je Zamenhof en pollandaj urboj.

Mi neniam eksciis, ĉu la nomo Zamenhof aludis ion por li, sed JUDISMO sur la kovrilo de la libro certe faris tion – ŝajne komprenebla vorto por polo, mi poste konstatis, ke judismo nomiĝas *judaizm* en la pola lingvo. Do, la ulo fingromontris la vorton JUDISMO kun malŝatega mieno kaj ŝajnis, ke li volas tuj disŝiri la libron. Per iom da peno mi sukcesis repreni la libron el liaj manoj sen damaĝoj, kaj decidis, ke per tiu libro mi ne duan fojon provos reklami Esperanton.


Mi strebas ne tro facile konkludi, ke poloj estus speciale ksenofoba nacio. La Pola Radio strebas nun, post ĉeso de la esperantlingvaj elsendoj, kontraŭi la malbonan reputacion per komenci elsendojn en la hebrea lingvo.

Zamenhof mem neniam fanfaronis pri sia juda deveno, kaj certe ne en la kunligo de Esperanto, ĉar li saĝe vidis, ke la judecon de la iniciat-

into iu volos uzi kontraŭ la lingvo. Sed oni ankaŭ ne povas nei la fakton, ke Zamenhof estis membro de juda komunumo, eĉ aktiva tia. La libron "Zamenhof kaj judismo", verkita de André Cherpillod, mi rekomendas la ĉiuj, kiuj ne timas vidi paralelaĵojn inter Esperanto kaj la hebrea lingvo.

En la sekvaj paĝoj Barbara Pietrzak laŭ mia peto iom resumas la staton de la Pola Radio kaj konsilas kiel daŭre aŭskulti ĝian programon en Esperanto per la interreto.

Mikko Mäkitalo



Esperanto en Pola Radio daŭras interrete

Eĉ tiuj, kiuj spertis proprahaŭte la lastajn du ekzistomonatojn de la E-elsendoj en la poreksterlanda programo, la tn. Radio Polonia de PR neniel povis imagi, ke la likvidon oni motivos per forta ŝovinisma argumento, en kiu multaj – enlande kaj eksterlande – rimarkis la antisemitan sintenon. Sed, por ke oni povu ĝin senĝene emfazi – jen rilate al redakciligantoj, jen en intervjuo farita de pollingva gazeto – devis aperi konforma politika realo. Tia realo nun regas en Pollando.

Mikko Mäkitalo prave atentigas, ke la Pola Radio strebas nun, post la ĉesigo de la esperantlingvaj elsendoj kontraŭi la malbonan reputacion lanĉante elsendojn en la hebrea lingvo. Nu, la Pola Radio por kontraŭi la malbonan reputacion post la likvido de E-elsendoj en la poreksterlanda programo samtage, kiam aperis la skandala intervjuo kun Jozef Targalski en „Gazeta Wyborcza” lanĉis la ideon de ripetaj E-programoj kaj sekve de la podkasta E-programo en la informadika strukturo de PR „Nowe Media”.

Sed post la unuaj bruaj favordeklaroj oni finfine trudis al la unusola redaktorino, neelteneblajn por pli longa perspektivo laborkondiĉojn ia. devigante labori ŝin tute sole kaj duonetate sen la rajto peti kunlaboron de malnovaj kaj spertaj gekolegoj, sendepende de la aĝo. Tia realo nun regas en Pollando. Anstataŭ konsideri ĉu koncerna persono kompetentas gvidi iun el la plej gravaj institucioj, kiu estas la publika radiostacio, ĉu tiu persono kompetentas gvidi krome la programon, kies tasko devus esti la lobiado por Pollando en la mondo – oni lasas lin kun plena da kompetentoj.

Kiam polaj amaskomunikiloj informis pri lanĉota hebrealingva programo nek per unu vorto oni menciis pri la podkastaj E-programoj de Pola Radio. Sed ja la podkasta programo – same kiel la E-elsendo kadre de poreksterlanda pro-

gramo – celas[is] popularigi Pollandon inter la eksterlandaj aŭskultantoj. Sed nun la estroj de unusola esperantlingva redaktorino estas ne ĵurnalistoj, sed informadikistoj!

Jes per la lanĉo de la hebreaj elsendoj la Pola Radio klopodas kontraŭi la malbonan reputacion, sed oni lanĉas tiun programon en momento, kiam samtempe Pola Radio en la plej proksimaj monatoj maldungos pli ol 455 laborantojn kaj envivigas drastan ŝparprogramon. Jes, la hebrealingva programo al ekstera mondo celas paligi la kontraŭsemitan eksceson de Jozef Targalski, kiu likvidante E-Redakcion referencis al la judeco de la kreinto de Esperanto. Sed enkonduko de la hebreaj elsendoj, kun samtempa senigo de la decaj laborkondiĉoj al la unusola esperantlingva ĵurnalistino senvualigas la verajn intencojn kaj veran vizaĝon de la decidalprenantoj, kaj spite ĉion konfirmas la forte naciismajn kaj maltoleremajn sintenojn de la aktualaj radioaŭtoritatoj.

Ĉu tio estos preteksto por likvidi podkastajn E-programojn? Tio evidentiĝos tre baldaŭ. Dume ankoraŭ eblas ilin aŭskulti!

Ĉar efektive la ĉesigo de la funkciado de la E-Redakcio de Radio Polonia kaj emisado de ĝiaj programoj pere de mallongaj ondoj, satelito kaj WRN afliktis tre multajn aŭskultantojn. Tamen daŭre ĉiuj esperantistoj povas aŭskulti kaj elŝuti la novformulajn, podkastajn E-programojn de Pola Radio pere de la paĝoj:

<http://www.polskieradio.pl/eo/> kaj

<http://www.polskieradio.pl/podcast/39/podcast.xml>

Dezirante, ke la E-programo atingu vin podkaste, ts. por aboni podkaston eblas ekzemple uzi la paĝon: <http://www.apple.com/itunes/overview/>. La trovebela tie programo *iTunes* funkcias same sub Vindozo kiel ankaŭ sub Mac Os X. Per tiu ĉi paĝo eblas ĝin elŝuti klakante la vorton ”download”. Sekvante propon- ▷

Joel Vilkki, matematikisto kun freŝaj ideoj pri lingvoinstruado

Por la junaj esperantistoj Joel VILKKI (1899-1976) estas plej konata kiel aŭtoro de la poŝvortaro *Suomi-Esperanto-Suomi*. En la granda mondo oni konas lin kiel inicianto de la eksperimento pri lernado de esperanto en la lernejo de Somero.

Joel Vilkki naskiĝis 8.8.1899 en Kalvola (apud Hämeenlinna) kie lia patro tiam estis pastro. De sia kvina jaro li loĝis en Helsinko, lernis en Helsingin normaalilyseo kaj ekstudis agronomion 1918. Tamen lia sanstato ne permesis al li laboron en kampoj kaj arbaroj. Tial li enskribiĝis en la fakultato pri natursciencoj. Kiam la universitato de Turku fondiĝis en 1922 Vilkki estis unu el ĝia unuaj studentoj kaj tie diplomiĝis 1924. Post unu studjaro kiel aŭskultanto en sia antaŭa lernejo en Helsinko li estis preta kune kun sia edzino Suoma trovi instruistan laboron en kamparo kun ebleco starigi ĝardenon. Post kelkaj mallongaj oficoj en diversaj lokoj li de 1929 estis instruisto kaj rektoro de la mezlernejo (de la j. 1942 liceo) en Somero.

Pri instruado Vilkki havis freŝajn ideojn inspiritajn de la Summerhill-lernejo, kie la lernantoj mem povis multe decidi pri sia lernado. Li en Somero praktikis gruplernadon kaj instigis al memstara esplorado. Li kompreneble avertis pri danĝeroj, ekzemple pri tio kio povas okazi se oni konstruas pireteknikaĵojn sen sufiĉa kono de la reakcioj.

Joel Vilkki ankaŭ studis la planlingvon Novial, sed finfine konvinkiĝis pri esperanto kaj estis ĉefdelegito de UEA (IEL) de 1937 ĝis 1971. Parolante en Helsinko pri novigo de la lerneja sistemo li en januaro 1939 menciis ke oni nepre enkonduke ins-


truu esperanton kiel unuan fremdan lingvon. En Somero li mem povis praktiki tion. Ne nur lernantoj, sed ankaŭ gepatroj kaj aliaj instruistoj lernis la internacian lingvon. Vilkki invitis ankaŭ eksterlandajn instruistojn por esperanto, same kiel por la angla. Tiel la lernantoj devis vere lerni kompreni kaj paroli la fremdan lingvon.

La vivoverkon de Joel Vilkki kronis la fama oficiala eksperimento dum la jaroj 1958-63. Pri ĝi li mem rakontis en *Esperanta Finnlando* 6/1968:

La paralelaj sekciaj klasoj B kaj C estis komparataj. La programo en la fremdaj lingvoj estis sama ekde la dua jaro (klaso), ankaŭ laŭ la lecionnombro dum la semajno, sed B komencis en la unua jaro (11-jaruloj) studi la germanan kaj C Esperanton, kun 6 lecionoj posemajne. Ankaŭ la geografio estis ekde la dua jaro instruata per la internacia lingvo.

Kiam por la eksperimento destinita 5-jarperiodo estis finiĝonta, inspektoro el la instrua administracio, lerneja konsilanto Olli Sampola vizitis la lernejon por esplori la lernadon de la fremdaj lingvoj ĉe tiuj komparaj klasoj, aprile 1963. En sia inspekta protokolo li interalie diras:

”La komenco de la lingvoinstruado per Esperanto laŭ la rezultoj de la ĝisnuna eksperimento almenaŭ ne malpliigis la eblecojn lerni aliajn fremdajn lingvojn. Tiel komparante la scipovon de la germana lingvo ĉe la 5B kaj 5C klasoj, la 5C donis al mi pli favoran bildon. Ĝi estis atinginta la nivelon de la 5B en la kurso, montris dum la lecionoj pli bonan aktivecon kaj ankaŭ en siaj skribaj taskoj estis pli elsta-





La tuta familio Vilkki en 1969: Juhani, Suoma kaj Joel Vilkki, Panu, Soili, Heljä kaj Simo. La foton sendis Simo Vilkki.

ra. La 3 C kompreneble postrestis la klason 3B en la kurso, sed la aktiveco de la klaso kaj lernemo ŝajnis evidente pli bona ol tiu de la paralela 3B." . . . "Akompanante la studadon ĉe la komencanta stadio mi rigardas ebla, ke la relative rapida progreso ĉe la studado de Esperanto instigas en la juna studento entreprenemon kaj memfidon kaj tiel progresigas ĝenerale la estiĝon de la favora pozitiva sinteno kontraŭ la lingvostudado."

Tiel favora kaj afabla raporto pri la signifo de la Esperanto por la lingvostudado ĝenerale estis eĉ por mi mem surprizo, rigarde tion ke la eksperimentado okazis en treege malfavoraj cirkonstancoj. Interalie mi mem malsaniĝis jam dum la unua eksperimenta jaro tiom grave, ke jaron poste mi devis entute lasi la laboron en la lernejo.

Feliĉe Vilkki vivis ankoraŭ 16 jarojn kiel emerita rektoro kaj dum tiu tempo li faris la ruĝan poŝvortaron aperinta en la jaro 1962. Poste li dum siaj lastaj jaroj laboris per plibonigo de la vortaro, kiu finfine aperis post lia morto helpe de lia filino Heljä Favén, la meza de kvin gefiloj.

Bedaŭrinde oni ne daŭrigis la eksperimenton post 1963. Ankaŭ en Somero oni ne plu instruas esperanton, sed oni memoras sian pioniron. En la urbo staras memorŝtono, malkovrita 100 jarojn post la naskiĝo de Vilkki kaj la lernejo posedas stipendian fondaĵon omaĝe al li.

En la biblioteko de Somero estas konservita la esperanta libraro de Joel Vilkki. Sur lia ekslibriso homo promenas sur malrekta vojo en verda stelo en la naturo. Tiel oni memoras Joel Vilkki kiel instruiston, esperantiston kaj ĝardeniston.

Carola Antskog

▷ atajn paŝojn iTunes-programo instaligōs en via komputilo. Ĉe la menuo de la elŝutita programo necesas elekti "Advanced" kaj alklaki ĝin por atingi la submenuon "aboni podkaston". Klakante sur ĝin sufiĉas nun englui la adreson: <http://www.polskieradio.pl/podcast/39/podcast.xml> Se ĉio okazis korekte, ekde nun la abonita E-programo mem ĉiutage aperos en via komputilo.

Krom la nombro de vizitoj sur la paĝo <http://www.polskieradio.pl/eo/>, la nombro de abonoj de la podkastaj programoj, daŭre gravas la korespondaj kontaktoj kun la redakcio. La adreso samas: esperanto@polskieradio.pl

*Barbara Pietrzak,
la lasta estro de la eksa
E-Redakcio de Radio Polonia*

Världens första transpirantoskiva

Följande information fick jag av Inga Johansson, en esperantobekant, i Sverige någon gång i oktober.

*Från Nybrokajen 11:s konsertprogram (det är Rikskonserters egen konsertlokal i Stockholm):
Fredag 3/11 kl 19.00*

Manskörkonsert

A cappella på transpiranto och nonsensspråk med studentkören Akademiska Sångföreningen från Helsingfors.

Releasekonsert

Inga Johansson brukar skicka intressant information – så också denna gång. Jag beställer skivan *Happi kvam pippi*. Titellåten är transpiranto för *Glad såsom fågeln*.

Vad är då transpiranto? Det låter snarlikt esperanto, inte sant? Transpiranto kom till i den fiktiva staden Grönköping. “År 1929 kunde *Grönköpings Veckoblad* kungöra en sensationell nyhet, nämligen att stadens folkskollärare *Ludvig Hagwald* hade konstruerat ett världsspråk. Han döpte det till transpiranto ‘på grund av dess ovanliga klarfattlighet’. Som prov på det nya språket återgavs Finlands nationalsång under titeln *Va paj*” skriver *hr redaktör Ulf Schöldström*, mannen bakom många av transpirantifikationerna som *Åkademiska Sångföreningen*

framför, fast i veckobladet är det förstås *Ludvig Hagwald* som skriver än i dag. Den första transpirantoöversättaren var *Nils Hasselskog*, folkskollärare liksom denne magister *Hagwald*. Med två texter, förutom *Vårt land Student-sången (Kanta studjosi)* skapade han ett mönster som fortfarande inspirerar till nya versioner av mer eller mindre kända dikter.

Grönköping är en ort där tiden tycks ha stannat, men veckobladets läsare som kan se bortom alla pretentiösa ordvändningar och gammaldags illustrationer kan inte undvika att se kopplingar till dagspolitiska skeenden.

Transpiranto är givetvis avsett att vara en parad på esperanto. “En stor esperantokongress hölls i Göteborg 1928, något som säkert inspirerade upphovsmannen till artikeln” skriver *Schöldström* vidare.

Den satiriska tidskriften *Grönköpings Veckoblad* såg dagens ljus 1902 då, får vi läsa i *hr bitr. maestro Simon Djupsjöbackas* betraktelse, *Akademiska Sångföreningen* stod i beråd att fira sitt 65-årsjubileum om några år, men det skulle visa sig att kören var ännu äldre. Medlemsförteckning från 1838 uppdagades varför Finlands äldsta kör nu förbereder sig att fira 170 år.

Anna Ritamäki

La unua kompaktdisko en transpiranto

En oktobro mi ricevis mesaĝon de Inga Johansson, konata esperantisto el Svedujo. Ŝi ofte atentigas pri interesaj informoj, ĉi-foje pri koncerto de Akademiska Sångföreningen de Helsingfors. Koncerto en Stokholmo estis anoncita, lanĉokonzerto de disko en transpiranto. Mi mendis la diskon *Happi kvam pippi*. La titola kanto estas transpirantigo de *Glad såsom fågeln*, feliĉa kiel birdo.

Transpiranto naskiĝis en la fikcia sveda urbo Grönköping, pri kiu raportas la satira gazeto

Grönköpings Veckoblad. La gazeto povis en 1929 raporti pri sensacia novaĵo. La popollern-eja instruisto *Ludvig Hagwald* konstruis mondan lingvon. Kiel specimenon de la nova kaj eksterordnare klara lingvo la gazeto publikigis transpirantigon de konata poemo *Va paj*, origine *Vårt land*, la nacia himno de Finnlando. Transpiranto estas parodio de Esperanto. Laŭ la informoj en la KD-kajero inspiron verŝajne donis granda Esperantokongreso en Svedujo 1928.

Novaj transpirantigoj aperadas en Grönköp-

ings Veckoblad, kiu daŭre raportas en pompa stilo kun malnovaj ilustraĵoj pri okazaĵoj en urbeta ŝajne postrestinta en iama glora epoko. Atenta leganto trovas ligojn al aktualaj mondaj fenomenoj.

Akademiska Sångföreningen, la plej malnova ĥoro en Finnlando, festos sian 170-jariĝon en 2008. Transpiranto kaj studentkuriozemo bone kongruas. Tion montras la sukcesa eldono *Happi kvam pippi* kun 22 kantoj en transpiranto.

Anna Ritamäki

Den första dikten på transpiranto, i original, på finska och på esperanto.

La unua transpirantopoemo, en la sveda originalo, en la finna kaj en esperanto.

Va paj, va paj, va farsipaj,
falsette glossan kar!
Nek hivas alpan celestaj,
nek firas kjuson, diskas kaj.
Amandalundo kvam Polar,
kvam fadripajan var.

Vårt land, vårt land, vårt fosterland,
Ljud högt, o dyra ord!
Ej lyfts en höjd mot himlens rand,
Ej sänks en dal, ej sköljs en strand,
Mer älskad än vår bygd i nord,
än våra fäders jord.

Oi maamme, Suomi, synnyinmaa,
soi, sana kultainen.
Ei laaksoa, ei kukkulaa,
ei vettä, rantaa rakkaampaa,
kuin kotimaa tää pohjoinen,
maa kallis isien.

Ho, patra land', amata ter'
sonegu kara vort'!
Nenia val', nek bord' en ver'
etendas sin sub la eter',
ravanta pli, amata pli
ol la patruj' de ni.

Det där med transpiranto har vi också esperantister inspirerats av. Här är *Ludwig Zamenhofs* mest kända dikt *Ho, mia kor'* (*Åh, mitt hjärta*) i transpirantoöversättning av *Martin Weichert*. Originalversionen, den på esperanto, publicerades i den allra första esperantoboken, den som gav upphov till språket, 1887.

Transpiranto inspiris ankaŭ nin esperantistojn. Nia plej fama poemo *Ho mia kor'*, aperinta en la unua libro, estas transpirantigita de Martin Weichert.

Moj Kroppsmotor'

par Lollo Dzamengoff

Moj kroppsmotor'! Nix bum-bum in hectiqo,
Nix ex moj büst nunc hüpfen au-dehors!
To keep balanço ist schon impractiqo.
Moj kroppsmotor'!

Moj kroppsmotor'! Nach period' rabota
In high-noon nix por mé medalje d'or!?
Nunc basta! Un valium por nervoza,
Moj kroppsmotor'!

Ho, mia kor'

de Ludoviko Zamenhof

Ho, mia kor'! Ne batu maltrankvile,
El mia brusto nun ne saltu for!
Jam teni min ne povas mi facile.
Ho, mia kor'!

Ho, mia kor'! Post longa laborado
Ĉu mi ne venkos en decida hor'!
Sufiĉe! trankviliĝu de l' batado,
Ho, mia kor'!



Humphrey Tonkin frapas kaj ravas

Dum kelkaj pasintaj semajnoj mia fidela kaj ŝatata kunulo estis nova verko *Lingvo kaj popolo* de prof. Humphrey Tonkin kun la subtitolo "Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado". Eldonis ĝin 2006 Universala Esperanto-Asocio. La libro havas kartonan kovrilon, kiu bele aspektas, kaj 159 paĝojn (A5), prezo 14,10 e. Tre praktike mi povas meti ĝin en la flankan poŝon de mia vintra surtuto. Tiu ĉi grava al mi publikaĵo konatiĝis kun multaj kafejoj en mia hejmurbo Turku.


Temas origine pri la prelegaro por la Interlingvistikaj studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano. Ni ĉiuj, kiuj estas vicaj membroj en lokaj societoj kaj apartenas al la popolo menciita sur la kovrila paĝo de la verko, bezonas ĝuste tiajn faktojn kaj informojn prezentitajn de prof. Tonkin.

Kio pri la venko en Montevideo?

Aferece kaj kompreneme la aŭtoro traktas esencajn detalojn, gravajn ankaŭ por ĉiuj unuopaj esperantistoj, kiuj emas pliprofundigi siajn sciojn pri la vivo kaj evoluo de la Zamenhofa lingvo. Leganto bezonas tempon por digesti ĉion. La materialo estas abunda. Multaj eroj, kiuj ne estas konataj al ordinaraĵoj, strataj esperantistoj, surprizas supozeble iujn.

La ĉapitro pri UN kaj Unesko donas argumentitan kaj klarigan vidpunkton koncerne la agadon kaj verajn rezultojn pro diversaj kampanjoj. Kaj por la veterana kaj la junulara generacioj la informoj ŝajnas utilaj. Laŭ Tonkin la vortoj "triumfo", "miraklo" kaj "venko", kiujn esperantlingva gazetaro kaj movadaj korifeoj uzis post la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo 1954 estas iom troigaj. Sobre la eksa prezidanto de UEA analizas koncernajn faktojn kaj ankaŭ postan evoluon kun kromaj atingiĝoj. Nepre ĉiu trankvile tralegu ĉi tiujn tiklajn punktojn.

Kiel veterano mi ĉiam fieras pro la tasko de vicrevizoro en la loka kluba vivo. Verŝajne oni facile kaptas la veran sencon de mia sinteno. Aliflanke ne mankas al mi diversaj aktivecoj en la movadaj kadroj. Tial apartan intereson mian vekis la sepa ĉapitro "La Esperanto-komunumo



en la mondo". Tonkin multflanke tuŝis la engaĝiĝon de societa membraro al aktiva agado. Ĉio rapide ŝanĝiĝas, kompreneble tiel okazas ankaŭ en niaj tradiciaj rondoj. Trafe oni prezentas novajn trajtojn – ekzemple interretan medion – por novuloj kaj spertuloj sur la nacia nivelo.

Leginda en universitatoj kaj klubejoj

La eterna demando pri la nombro de esperantistoj ricevas lumigon el novaj, freŝaj vidpunktoj. Studado kaj ekzamenoj pri Esperanto en la hungara Eötvös Loránd Universitato liveras atendatajn, tre paradoksajn rezultojn. Jam antaŭ jardeko Ferenc Jáki klarigis al mi en Budapeŝto, pri kio vere temas. Verŝajne tute alia estas la situacio nune en Poznano kaj en la tiea Universitato. Evidente ni ĉiam bezonas por parolaj ekzercoj allogajn klubejojn, en kiuj ni povas ĉe kafotaso nutri nin per lingvaj spicaĵoj kaj novaĵoj el nia tutgloba Esperanto-vilaĝo.

Lingvo kaj popolo estas plenplena de legendaj kaj interesaj faktoj. Nur supraĵe mi sukcesis laike skrapii la enhavon de la libro – kvazaŭ nur etan surfacan parton de Esperanta oceano. Prof. Tonkin skribas erudicie kaj plaĉe. Same elegante li parolas. Tion mi konstatis sur la ondoj de Pola

Grava legaĵo povas esti facila

Certe vi iam renkontis la vortojn “selkokirja”, “lättläst bok”. Tiaj facile legeblaj libroj estas bonegaj por komencantoj en kiu ajn lingvo. La leganto ĝuas ĝuste tion, ke li facile komprenas kaj digestas la lingvon kaj samtempe lernas ne nur pli da lingvo sed ion novan pri koninda temo.

Kiel ekzemplon mi prenas la libron *Suuria ajattelijoita* (Grandaj pensistoj) de Tomas von Martens, vd. detalojn flanke.

Kio igas la lingvon facila?

Ĉiu linio konsistas nur el 3-6 vortoj kaj enhavas klaran, nerompitan penson aŭ sciigon. Tion ebligas la nerektigita dekstra margeno. Komoj kaj punktoj estas racie uzataj. Ĉiupaĝe la aspekton de la teksto ekvilibrigas gracia kadro. La vortostoko estas zorgeme pripensita. La verkisto ne postulas multon da tempo kaj penado de la leganto, kaj intermite li amuzas la leganton per trafaj detaloj. Li tralegis centojn, eble eĉ milojn da paĝoj da filozofio por doni al ni mallongajn kaj klarajn resumojn de la verkoj kaj vivo de dek famaj filozofoj, kiuj vivis en la 19a jarcento

Tomas von Martens, *Suuria ajattelijoita*; ruotsinkielisestä käsikirjoituksesta suomentanut Ari Sainio; RAY:n tuella julkaissut Kehitysvammaliitto, 126 sivua. ISBN 951-580-412-4. Gummerus Kirjapaino Oy, Jyväskylä 2006.

Halvin tie saada kirjaa on tilata suoraan Kehitysvammaliitolta joko soittamalla tai heidän nettikaupastaan: www.kehitysvammaliitto.fi/kauppa
Puh: (09) 3480 9350, sähköposti: opike@famr.fi

aŭ pli ol 2000 jarojn antaŭ ni. Li ankaŭ trovis naŭ nigrablankajn fotojn por konatigi nin al ilia aspekto. Legante la libron oni ĉiulinie sentas, ke oni lernas kaj progresas.

Kiel ekzemplon mi esperantigas kelkajn liniojn el la antaŭparolo. (Mi petis permeson de la aŭtoro; li afable jesis kaj diris, ke ni rajtus esperantigi la tutan libron.)

*”Vi eble pripensis,
kia la mondo vere estas?*

Kio estas la vivo?

Kial mi estas ĉi tie?

Kiel mi vivu bonan vivon?

*Tiajn ’eternajn’ demandojn pritraktas filozofio.
Ĉiam homoj primeditis
la samajn aferojn.* ▷

▷ Radio dum elokvente plenumitaj intervjuoj. Li kribris konvenan legaĵon por movadanoj ĉie en la mondo. Lia prelegaro estas science redaktita kaj antaŭ ĉio pense riĉiga. Gestudentoj de Ilo-na Koutny en Poznano povas esti feliĉaj kaj fieraj, ke ili nun havas libroforme altkvalitan studmaterialon.

Klubaj lingvoinstruistoj utiligu ĉi tiun okazon kaj elektu la verkon de Tonkin sub lupeon de legemaj gesamideanoj. Ni finnoj povus montri la vojon ĉirilate kaj mendi la libron (ISBN 92 9017 093 X) ĉe EAF aŭ rekte de UEA en Rotterdam.

Jaroj pasas. Permesu al mi fine mencii, ke mi interpretis por prof. Tonkin en la Universitato

de Turku 1975, kiam li vizitis ankaŭ la Aŭtunajn Tagojn de nia landa asocio en Kuhmo ĉe la nord-orienta landlimo. Tiu eta, agrabla rememoro donis al mia komputila klavaro malpezajn flugilojn. La rezulton vi povas gustumi ĉi tie. Atentan librostudadon deziras

Jorma Ahomäki

P.S. Fakulan, profundan recenzon skribis en Libera Folio mia samlandano el la Universitato de Helsinki prof. Jouko Lindstedt, kies teksto tre taŭgas kiel enkonduka legaĵo por la prezentita verko:

www.liberafolio.org/2006/tonkinrecenzo

La Esperantisto de la Jaro 2006

Sendependa internacia magazino “La Ondo de Esperanto” iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Al la projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Ĉi-jare estis proponitaj 21 personoj, al kiuj la elektantoj povis doni siajn voĉojn. Plej grandan kvanton da voĉoj ricevis Bertilo Wennergren, sekve plej grandajn Peter Zilvar kaj Chuck Smith.

Sveda esperantisto Bertilo Wennergren, loĝanta nun en Koreio, estas proklamita kiel la Esperantisto de la Jaro 2006 pro la “Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko” (PMEG).

(el komunikado de LODE redaktis mm)

Ekzameno kaj kongreso en Lesjöfors

En Lesjöfors, Svedio, eblos trapasi ekzamenojn laŭ la reguloj de ILEI/UEA. ILEI-se kaj SEF invitas esperantistojn por ekzameniĝi en Lesjöfors la 17an ĝis la 18a de majo, kaj rekomendas partoprenon en la SEF-kongreso la 19an–20an. Dum la interkona vespero, vendrede, Mireille Grosjean, Svislando, informos pri la laboro de IEK, Internacia Ekzamena Komisiono, kaj Agneta Emanuelsson informos pri januara kunveno en Chaux-de-Fonds. Krom la kutimaj jarkunvenoj dum la SEF-kongreso, Flory Witdoeck el Belgio prelegos pri Esperanto en EU. Dimanĉe estos ekskurso.

Kontaktu: Siv Burell, sekciestro de ILEI en Svedio, siv.burell@telia.com

Libroservo de UEA: plialtigo de sendokostoj

Pro daŭra plialtiĝo de sendokostoj la Libroservo de UEA ne plu povas reteni sian regulon, laŭ kiu ĝi fakturas minimume 2,25 eŭrojn. Tiu minimumo validis pli ol 25 jarojn, ekde junio 1981. Ĝi eĉ estis malaltigita en 1999, kiam la financa administrado de UEA transiris al eŭroj. Ekde la 1-a de januaro 2007 la minimumaj sendokostoj estas 4 eŭroj. Sen ŝanĝo validos plu la baza regulo, laŭ kiu la Libroservo fakturas por ekspezo 10% de la mendosumo. Sekve la plialtigo koncernos nur mendojn sub 40 eŭroj.

(el Komunikado de UEA koncizigis mm)

Internacia Esperantorevuo por ĉiuaĝaj lernantoj kaj komencantoj

La revuo havas tre varian enhavon sur siaj 52 paĝoj trifoje jare. Ĝi estas bunte ilustrita kaj havas plenkolorajn kovrilojn. La lingvaĵo estas zorge kontrolita. Kontribuantoj loĝas en trideko da landoj. Sekve en la numero 3/2006 ekzistas rakontoj ekz. el Kubo, Nepalo, Israelo, Germanio, Hindio kaj Vjetnamio. Kantoj ekz. de Anja Karkiainen kaj diversaj enigmaj taskoj malpezigas la enhavon. Kion vi pensas pri “Kontrolu vian lingvoscion per testo”, “Bildoj el la historio de Esperanto” aŭ “Lingva doktoro; por bona lingvoscio”? Por infanoj estas apartaj paĝoj.

La prezo estas 14 e. Ekde 3 ekz. al la sama adreso po 11 e.

Vi povas aboni Juna amikon de Sylvia Hämmäläinen, Teivaalantie 85, 33400 Tampere.

Pagu al ŝia konto 800028-10300680.

▷ *Oni rajtas do diri, ke ĉiuj homoj estas iaj filozofoj. Certe ankaŭ vi!”*

Kvankam mi estas intelektulo “normala” homo, mi trovas la libron tre taŭga al mi kaj aliaj. Bedaŭrinde ĝi ne estas trovebla en ordinara librovendejo. Ĉiu biblioteko devus havigi ĝin al sia klientaro. Ĉu ni havas facile legeblajn sed ne por-infanajn librojn en Esperanto?

Raita Pyhälä

Esperanto-Asocio de Finnlando
Suomen Esperantoliitto ry.

Vintraj Tagoj

Talvipäivät

10.-11.3.2007

*Kunvenejo: Hotelo Seurahuone Kotka,
 Keskuskatu 21, 48100 Kotka,
 tel. 020123464*

Jubilea jarkunveno
en la mara urbo Kotka

Juhlavuoden vuosikokous
merellisessä Kotkassa

Jam kvardeko de esperantistoj aliĝis al la unua aranĝo de la jubilea jaro – venu ankaŭ vi al Vintraj Tagoj en la mara urbo Kotka. Jen la programo kun detala horaro, notu tamen ke etaj ŝanĝoj eblos. Ni aranĝos ankaŭ ĉi-foje informan elementan esperantokurson, instruos Raita Pyhälä. Sabate antaŭ la vespermanĝo estos kiel jam tradicie akcepto por membroj de subtena Societo Nino Runeberg (subtena membrotizo 36 e). Post la vespermanĝo ni promenos ankoraŭfoje en la urbo kaj poste havos subtenan jubilean aŭkcion, kiun gvidos Harri Laine. Se vi aŭ via asocio havas aĵojn vi deziras donaci por la aŭkcio, bonvolu kontakti la sekretarion.

Jo nelisenkymmentä esperantoharrastajaa on ilmoittautunut Kotkan päiville – tule sinäkin tähän juhluvuoden ensimmäiseen tapahtumaan. Tässä tiedoksi päivien aikataulu, johon kuitenkin voi tulla pieniä tarkennuksia. Tälläkin kertaa on ohjelmassa erityisesti kotkalaisille suunnattu esperanton alkeis- ja tutustumiskurssi, opettajana Raita Pyhälä. Ennen lauantain illallista järjestetään jo perinteeksi muodostuneeseen tapaan vastaanotto liiton kannatusseuran Societo Nino Runebergin jäsenille (tukijäsen-

ALIĜILO

Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF 10.-11.3. 2007 en Kotka.

Nomo _____

Adreso _____

Tel./Fakso/Ret-adreso _____

Aliĝkotizo:

21e _____

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo. Personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

VT-paketo 10.-11.3.

inkl. manĝojn (vespermanĝo sabate, lunĉo dimanĉe, kafo) en hotelo Seurahuone en Kotka _____ 44 e

Pri tranoktoj bv. legi en la teksto.

Entute pagenda al la konto de EAF _____

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825.
 Bv. uzi la VT-referencnumeron **4640** (en la paginformoj nur la referencnumero)

Pliaj informoj aŭ deziroj _____

Bonvolu sendi la aliĝilon al:
 Esperanto-Asocio de Finnlando
 Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
 Retaj aliĝoj tra eafmendoj@esperanto.fi
BONVENON!

ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton talvipäiville 10.–11.3.2007 Kotkassa.

Nimi _____

Osoite _____

Puh./faksi/sähköposti _____

Ilmoittautumismaksu:

21 e _____

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset. Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

VT-paketti 10.-11.3.

sis. ruokailut (illallinen, lounas, kahvi) hotelli Seurahuone Kotkassa.

_____ 44 e

Majoitukset ks. teksti.

Maksut yhteensä Suomen Esperantoliiton tilille _____

